

### **Konsiloj pri traktado da rubo:**

Kelkfoje estas oficialaj reguligoj kiuj postulas troan pakumadon; sed kelkfoje temas pri afero de allogi la achetontojn.

La moderna tendenco acheti rete, altigas la bezonon da pakumajhoj, kaj transporton. Plejbone eviti rubon pere de pli-longdaŭra uzado de iuj ajn materialoj.

Prefere apliki selektan kolektadon kaj recikligadon de chiaj materialoj, kaj pli prefere eviti la uzadon de plastajhoj - ekz-e postulante kotizon por plastaj saketoj.

Uzi vitran (au plastan) replenigeblan botelon taugas tiam, se la returna vojo estas ne tro longa.

Mi avertas bruligi plastan rubon en cement-forno; ĉar tie povas rezulti san-dangheraj dioksinoj. Se oni bruligas la restantan rubajhon sub tre altaj temperaturoj, poste elektrike filtras kaj lavas la fumgason reduktas la san-minacon.

Necesas lerni el la spertoj de aliaj landoj. Necesas instruado de la civitanoj kaj financaj rimedoj.

---

### **Raporto: Ronda Tablo pri Rubajhoj en Kroatio:**

La 30-an de novembro 2012 kaj Sekcio por defalaĵo de Scienca konsilio por naturprotekto de Kroata Akademio de la Sciencoj kaj Artoj (HAZU) Kroata negoca konsilio por daŭrigebla disvolvado (HRPSOR) okazigis la rondan tablon sub titolo "Kiel al tuteca sistemo de mastrumado de defalaĵo". Partoprenis reprezentantoj el entreprenoj, institutoj, fakultatoj, ministerioj kaj cititanaj kaj politikaj asocioj. Ĉefa celo de koncerna ronda tablo estis pritrakti problemojn de manko de tuteca sistemo de mastrumado pri defalaĵo en Respubliko Kroatio. Akademaiano Franjo Tomić je la nomo de menciita Sekcio por defalaĵo akcentis ĝian rolon en kreado de Leĝo pri defalaĵo, samtempe ĝi pledas por neeksto de defalaĵo, selekta kolektado kaj recikligado. Pri problemoj de defalaĵoj je ekzemplo de unu entrepreno por produktado de cemento "Cemex Hrvatska" parolis ĝia prezidanto de direkto s-ro Trpimir Renić. Prezidanto de asocio "Verda akcio" (agado) Bernard Ivčić parolis pri preterlasoj de lokala administracio en kolektado de defalaĵo ofte sen adekvataj punoj kaj sankcioj. Ankaŭ ekspozadis s-roj Aleksandar Rajilić el Ministerio pri protekto de medio (enviro) kaj naturo de Respubliko Kroatio, Teo Čolan, konsilanto el Fonduso pri energetika efikeco kaj protekto de medio, profesoro d-ro Neven Voća, estro de Agencio por protekto de medio (AZO), Žarko Horvat, direktoro de industria ekologio en entrepreno "Holcim Hrvatska" kaj d-ro Mustafa Nušinić, scienca konsilanto el Ekonomika instituto Zagreb kaj s-rinoj Dragica Bagarić, direktorino de "Eko Ozra", profesorino d-ro Tajana Krička, dekanino de Agronomia fakultato Zagreb kaj Dijana Varlec, sekretariino de Komunumo por protekto de medio ĉe Kroata ekonomia ĉambro. Interesa estis diskuto de d-ro Viktor Simončić, eksa funkciulo de Ministerio de medioprotekto pri devigoj kiujn Kroatio transprenis dum trakado en kontrakto por sia aliĝo al Eŭropa Unio, pritaksinte ilin kiel tre severaj sen ebleco por realigi ilin enkadre de limigitaj limdatoj. Je la fino de ronda tablo menciitaj organizantoj interkonsentis kunlaboron je koncerna problemaro.

Raportis: Zlatko Hinšt